

UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Nieuwe Binnenweg 176

3015 BJ Rotterdam

Nederlando

Rim.: Ni rekomendas uzi la retan formularon ĉe: <https://mallonge.net/mendilo2022>

MENDO DE SALONO AŬ BUDO DUM LA 107-a UK (Montrealo, 6 - 13 aŭgusto 2022)

Al: Fakaj Asocioj kaj organizantoj de fakaj kunvenoj

Artikolo 2.5 de la Kongresa Regularo de UEA tekstas:

“UK disponigas salonon (proporcian al la grandeco de la koncerna organizaĵo) senpage por unu kunveno al Faka Asocio aliĝinta al UEA kaj kontraŭ pago por unu kunveno al Faka Asocio kunlaboranta kun UEA, kondiĉe ke la salono estu petita antaŭ la 15-a de marto de la kongresa jaro. Por pliaj kunvenoj kaj por kunvenoj anoncintaj post la 15-a de marto, oni postulas kompensan pagon por la salono, se ankoraŭ havebla. Salonoj povas, laŭ la eblecoj, esti disponigitaj kontraŭ pli alta pago al aliaj internaciaj movadaj instancoj.” (Ĉi-jare, eksterordinare, la limdato por salonmendoj estas la 30-a de majo 2022, sen aldona kompensa pago.)

La senpagan salonon oni disponigas por maksimuma daŭro de du kunvenhoroj (kunvenhoras estas tempobloko de 45 minutoj), kun eventuala 15-minuta paŭzo inter la du blokoj. Maksimuma grandeco de salono, laŭ la haveblo, por senpaga mendo: 50 personoj. Por ĉiu ekstra kunvenhoras ankaŭ la aliĝintaj Fakaj Asocioj pagas oblon de unuhora tarifo.

La “kompensa pago” (t.e. luo) varias laŭ la salongrandeco. Enestas ankaŭ aparta tarif-kategorio por asocioj neligitaj al UEA. Jen la tarifoj por la UK en 2022:

Kapacito, ĝis maksimume:	Prezoj en eŭroj por 1 kunvenhoras (45 minutoj)			
	50 pers.	60 pers.	100 pers.	220 pers.
I – aliĝintaj kaj kunlaborantaj FA	40	55	100	180
II – aliaj	80	110	200	360

Por pli ol unuhoraj kunsidoj la prezo estas oblo de unuhora tarifo por ĉiu horo.

Por eventualaj ekipaĵoj necesas krompagi (vidu la prezojn en la mendilo).

N.B. Frueco de via mendo povas esti decidiga faktoro pri ĝia sukceso!

Se la mendo estos akceptita, UK disponigos la salonon kaj enprogramigos la kunvenon. La mendanto respondecas pri la enhavo de la aranĝo kaj, krome, promesas liveri al la Kongresa Gazetara Servo skriban raporton pri la kunveno maksimume unu horon post ĝia fino.

Organizantoj de fakaj kunvenoj bv. klopodi akordigi la enhavon de la kunvenoj kun la kongresa temo: Lingvo, vivo, tero: Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj.

BUDOJ: Mendo de budo (stando) en la kongresejo kostas 400 eŭrojn por la kongresa semajno (t.e. ekde dimanĉo post la 14h00 ĝis sabato 14h00). Pro spacomanko nepras, ke la mendoj alvenu tre frue, ĉiukaze antaŭ la **30-a de majo**. Bv. sendi vian mendon per aparta letero, ne sur la dorsflanka mendilo pri faka kunveno! La mendo devas veni per retmesaĝo al kongresoj@co.uea.org aŭ al la Centra Oficejo (adreso supre). La temo de la mesaĝo devas esti “Mendo de budo por la 107-a UK”.

* * *

Ĉu ni sendis tiun ĉi mendilon al la ĝusta adreso? Se ne, bv. ne nur plusendi ĝin, sed ankaŭ avizi nin pri la nova adreso de via asocio. Koran dankon!

MENDILO POR FAKA KUNVENO DUM LA 107-a UK

Organizaĵo: _____

Rilato kun UEA (bv. kruci unu kategorion):

Aliĝinta Faka Asocio (FA) Kunlaboranta FA Sen kontrakto kun UEA

Detaloj por publikigo

1. Tipo de kunveno _____
2. Temo de kunveno _____
3. Celo de kunveno _____
4. Respondeculo dum la kongreso _____ KN-ro _____
5. Publika invitata: nur membroj (fermita) ĉiuj kongresanoj

Daŭro de la kunveno (bv. kruci):

kunvenhoru 2 kunvenhoroj 3 kunvenhoroj 4 kunvenhoroj 5 kunvenhoroj
La organizantoj rekomendas ke oni faru 15-minutajn paŭzojn post ĉiu kunvenhoru (45')
por ebligi transiron al/de aliaj kunvenoj, kiuj samtempe okazas.

Preferata salon-aranĝo, plenumbla laŭ la surlokaj kaj organizaj kondiĉoj (bv. kruci):

teatra (nur sidlokoj) lerneja (kun skribotabloj) u-forma aŭ kvadratforma
 sentabla kaj senseĝa alia: _____

Kapacito de la salono ĝis (bv. kruci):

50 60 100 220

Bezonataj ekipaĵoj:

video/Powerpoint-projekciilo (€5/h)
 projekciilo (€10/h) alia(j) _____

Sumo pagenda (salono + ekipaĵoj): € _____

Prefere la kunveno ne koincidu kun jenaj aliaj programeroj de la Kongreso: _____

- Laŭ la Kongresa Regularo nia kunvenejo estas senpaga (nur la aliĝintaj fakaj asocioj).
 Bv. debeti la kostojn al nia UEA-konto, kodo: ____ _ _ _ _ _ _ _ _ .
 Ni sendas la pagon al la UK per _____. UEA-kodo: ____ _ _ _ _ _ _ _ _ .

DEKLARO: La mendanta organizaĵo, per la subskribo de sia reprezentanto, rekonas la neŭtralecon de la Universala Kongreso kiel manifestaĵo de UEA kaj promesas fari nenion (ekz. disdoni presaĵojn) en la kongresaj ejoj tiel ke tio povus kompromiti la neŭtralecon aŭ la reputacion de UEA.

Dato _____ Nomo (preslitere) _____

Funkcio _____ Subskribo _____

(Bv. resendi al la CO de UEA antaŭ la 30-a de majo!)

por la uzo de la administracio

Kotizo pagita por _____ Faturebla al _____ Konfirmilo _____

Dato _____ Salono _____ Horoj _____

ĈI TIU MENDILO ESTU RESENDITA KUN LA KONCERNA PAGO AL LA CO, ROTTERDAMO.